# SENNACIULA LIBERPENSULA PAĜO

N-o 14 REDAKTAS LIBERPENSULA SEKCIO DE SAT N-o 14

Manuskriptojn sendu al: KURT HUBRICHT, Leipzig O 30, Mariannenstrasse 22. Sekretario de la Sekcio: KURT KLAPS, Danzig, Karpfenseigen 12.

## PRI ATEISTA LITERATURO EN ESPERANTO

Lastan jaron en nia esperantist-liberpensula kampo ni povas karakterizi kiel jaron de granda vigliĝo, precipe en eldonagado.

Ni konstatas regulan aperon de "Liberpensula Paĝo", kvankam ne regulan, tamen aperadon de "Liberpensula Servo". Krom tio "Esperanto-Servo" k "S-ulo" ĉiam havis apartajn artikoletojn priliberpensajn. Ni konkludas, ke por tiuj kontraŭreligiaj problemoj ekzistas plifortiĝanta intereso.

Estas kompreneble, ke en tiaj cirkonstancoj estas tre bezonataj pli seriozaj iloj por kontraŭbatali religion, kiu nun tutforte apogas sin sur kapitalista mondo, kiu nun estas plej fidinda servanto al la kapitalo. Ankaŭ estas kompreneble, ke niaj liberpensuloj prizorgas eldonon de speciala liberpensula literaturo en esperanto.

Kiel unuan printempan birdon ni povis noti tiurilate specialan kontraŭpaskan ateistan numeron de "La Nova Epoko", kiu precipe enhavis kontraŭreligiajn originalaĵojn. Ĝi estis senduba sukceso, sukceso eĉ en tiu rilato, ke la numero estis kunmetita de K-doj el diversaj landoj kaj ĝi havis sciencan seriozan propagandartikolon (ankaŭ originalan) de famekonata en Sovetio kontraŭreligiulo K-do Rumjancev. La artikolo temis pri deveno k miteco de l' paska legendo, senmaskigis ekspluatistan karakteron de l' festo. Ĉi tiu numero de "La Nova Epoko" sendube plenumis sian rolon de liberigilo proletara.

Sed precipe grava momento estis, kiam nia esperantista liberpensularo ekposedis la unuan kontraŭreligian libron en esperanto. Ĝi estis traduko de Lenin-artikoloj pri religio (Lenin "Pri religio", eld. de CK SEU kaj Tutsovetia Ateista Unio). En tiu libreto nia tutmonda liberpensularo esperantista ekposedis tre seriozan, vere marksisman analizon k koncepton pri la religio, ankaŭ traktadon de la problemo pri rilatoj al religio flanke de laborista partio, problemo, kiu multe estas diskutata en la mondo k interesas ankaŭ la esperantistojn. La libro, kiu estas vigle aĉetata de K-doj el diversaj landoj, okulvideble, ĝuste kontentigis nian esperantistan liberpensularon. Dank' al tio ni povas konstati, ke la libro ĝuste trafis sian celon kiel kontraŭreligia batalilo.

Poste ni ekhavis alian libron, tradukitan el la rusa lingvo: "M. Ŝejnman. Milito kaj religio". La temo tuŝas plej aktualan problemon. La mondo estas skuata de militdanĝero, proletoj el ĉiuj landoj tion bone spertas, sed ne ĉiuj komprenas, kiun rolon en tiu kapitalista preparado por milito plenumas eklezioj k religio entute. La libreto estas saturita per plej aktualaj faktoj el tutmondo, kiuj klare montras, kiel aktive la religio partoprenas tiun militpreparon, ankaŭ kontraŭ Sovetio. Per ĉi tiuj multaj faktoj la broŝuro bone edukas en proletoj batalemon kontraŭ kapitalista mondo k ties servantoj, inter kiuj la religio nun ĉefas. La libro serioze k diversflanke pritraktas tiun aktualan problemon. La ĉefa intereso je la libro estas, ke ĝi analizas problemon per nuntempaj faktoj, ne antikvaj k historiaj, pro kio ĝi estas plej komprenebla al ĉiu proleto, ne sperta en historiajoj, tamen informita pri lastaj faktoj de monda politiko. Ni devas taksi tiun liborn kiel komencon de aktualiĝo de nia literaturo, en tio konsistas ĝia precipa valoro.

Estas rimarkinde, ke tiun elpaŝon en liberpensula literatura kampo faris sovetiaj ateistoj-esperantistoj. Ni devas konstati, ke alilandaj K-doj ĝis nun neniom preskaŭ prizorgas por konatigi en esperanto plej valorajn liberpensaĵojn diversnaciajn.

Finante ni povas informi la legantaron, ke ankaŭ sovetiaj K-doj jam liveris al SAT-kooperativo du novajn manuskriptojn ateismajn: E. Jaroslavski, "Pensoj de Lenin pri religio" k malgranda broŝureto pri deveno de religio. Ankaŭ jam estas tradukita k eldonota la libro de M. Ŝejnman "Moralo proleta k moralo religia". Estas nun tradukataj k enplanigitaj por eldono de CK SEU kaj Tutsovetia Ateista Unio kelkaj aliaj broŝuroj. K-do Rumjancev nun originale verkas en esperanto libreton "Ĉu ekzistis Kristo?" k K-do N. Incertov ankaŭ originalan broŝuron "Al kiu servas baptistoj"?

Ni devas saluti niajn esperantistojn-liberpensulojn, kiuj ekzemplon donas kreante fakan literaturon en esperanto. Ni devas deziri, ke liberpensuloj de diversaj landoj sekvu la vojon de sovetiaj ateistoj-esperantistoj k pliriĉigu esperantan literaturon per modelaj verkoj liberpensaj de diversaj landoj. *259.*

BIBLIOTEKO DE SENNACIULO

N-o 7

**La Vojo al Scienco de Estonto**

de Akademiano *Fersman*

Tradukis *S. Rublov*

Kun speciala antaŭparolo de l' aŭtoro por la esperanta eldono. — Tre interesa popularscienca verketo, tute aktuala, montranta larĝajn perspektivojn en la estonton. — Ĝin ĉiu K-do legos kun granda ĝojo.

**Prezo: 0,60 mk. g.**

**Administrejo de SAT, Colmstr. 1, Leipzig O 27**

## Batalorganizo de l' Belgia Eklezio Katolika

La katolika eklezio en Belgio enpenetras ĉiujn kampojn de l' publika vivo. Apud ĉiu fako ĝi kreas la "katolikan"; eĉ la morala sinteno de ĉiu belga civitano estas ŝirmata kontraŭ la malvirtoj de nia socio. Spirite tiu pastra ĉestaranto apud ĉia manifestacio de l' amaso estas ja danĝero por la senantaŭjuĝuloj, sed sufiĉus por ĉi tiuj unuiĝi k forte lukti sur la spirita batalkampo por venki la malkleron.

Sed mono estas nervo de l' milito. La klerikaluloj jam delonge komprenis ĉi tiun proverbon k aplikis ĝin. En Belgio ĉe bankoj k sur ekonomia kampo ĝi estas observata.

Belgio konsistas el 2 landoj malsimilaj unu je la alia, *Valonio* (franca) k Flandrio (ĝermana), kiu grandparte estas agrara (kontraŭe je Valonio, kiu estas ĉefe industria), sekve religiema. La buĉado de 1914—18 pliriĉigis la flandran kamparanaron k samtempe pligravigis la potencon de ĝiaj profunuiĝoj.

Fondita en 1890, la kamparana "sindikato" (*Boerenbond,* elp. Bur'nbond) celas helpi konsili siajn anojn pri ĉia ajn agrara temo. Sed tio ne nur estas ĝia rolo. La pastraro, kiuj estas ĝiaj gvidantoj (la nuna ĝenerala sekretario estas abato) devigas ĉiun praktiki la katolikan religion. Kredu aŭ malsatu! Sekve la Kamparana Ligo estas grava pezo en la politika pesilo.

Kia estas ĝia potenco?

Je la fino de 1928 ĝi grupigis 121 455 familiojn disdividitajn en 1 203 gildojn (t. e. komunumaj sekcioj); kvankam bazata sur loka organizsistemo, la K. L. estas forte centrigita. La "stabo" troviĝas en la urbo *Loveno* (nederland-lingve: Leuven), el kie disiras ĉiuj ordonoj.

La monaj negocoj estas koncentritaj en la *"Centra Kredit-Kaso"*, kiun aliĝas 980 ŝparkasoj.

Depost la milito la K. L. pli k pli okupiĝas pri financa politiko, kiu adaptiĝas je ĝia agrara aktiveco. Dum la printempo 1928 ĝi partoprenis la Frankfurtan foiron k aliajn aranĝojn.

Ĝia *"Centra Aĉet- k Vend-Oficejo"* en 1927 aĉetis por 376 milionoj da fr.